1 / 2017

esperanto.cu

TRIMONATA BULTENO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

**Ĉi-numere legu pri:**

KERo / Komitatkunsido kaj elektoj en KEA / Boatekskurso en Santiago de Cuba / Librofoiro en Havano / Literatura Konkurso 2016 kaj 2017 / Konkurso "Teo kaj amo" / Kreoliĝo de Esperanto / Estrara Komuniko…

# 6-a KERo: Semi konstante en Zamenhof-Jaro

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Jam dum ses jaroj sinsekve la kuba esperantistaro atendas la jaran rekontiĝon KERo, kiu naskiĝis kiel varianto de tutlandaj eventoj kaj samtempe kiel ebleco ferii en eksterurba kampadejo. Ni povas diri, ke nuntempe ni ĉiuj atendas ĝin por esperantumi en natura etoso, renkonti la malnovajn geamikojn, lerni, ekskursi, kunsidi kaj ĝui nian esperantistecon.

Tial, ĉi-jare, de la 15-a ĝis la 19-a de marto okazis la 6-a Kuba E-Renkontiĝo (KERo), en la centra provinco Villa Clara, en la feriejo Río Seibabo. La renkontiĝon ĉeestis, laŭ la plej lastaj statistikoj, 119 geesperantistoj el la tuta lando.



*"Honori, honoras": Gratulo al instruistoj kun plej bonaj rezultoj dum 2016.* Foto: Juan Carlos Montero Medina.

La unuan tagon sesiis la 33-a Ordinara Kunsido de la Komitato de KEA, dum kiu oni analizis la Jarraporton pri la Agado 2016, okazigis elekton de nova estraro kaj skizis la ĉefajn agadojn por la nuna jaro 2017, inter kiuj elstaras la intensigo de kursoj bazaj kaj progresigaj; ankaŭ konkretiĝis agadoj okaze de la Zamenhof-Jaro en Cienfuegos kaj Santa Clara, en la centro; kaj en la orientaj provincoj Granma, Santiago de Kubo kaj Guantánamo, kiu okazigos la jam tradician eventon Zamenhofa Metiejo.

La programo de KERo ekis la 17-an per Seminario pri Informado kaj grafika propagando; ankaŭ okazis ateliero pri "Kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon"; samtempe sesiis paroligaj kursoj, gviditaj de Juan Carlos Montero Medina kaj Cirilo Ramos Piñero, ankaŭ bazaj kaj mezaj ekzamenoj de KEA, gviditaj de estrarano Julián Hernández Angulo; kunsido de la ILEI-Sekcio, kies estro estas Gonzalo Collantes García; kunsido pri Zamenhof-Jaro, literatura rondo kaj tradukado; funkciis elŝutejo, radioamatoraj aranĝoj, okazis ekskurso al historia loko ĉe la montoĉeno Escambray, kie situas la feriejo; kaj la vesperaj aranĝoj inkluzivis prezenton de dokumenta filmo pri la grupo Amindaj kaj la urbo Contramaestre, kiuj spektigis la muzikvideon "Teo-revoj en Amo-taso", kiu konkursas en Teo kaj Amo, la internacia konkurso de Ĉina Radio Internacia; la vesperoj estis riĉigitaj per la arto de la kubaj esperantistoj kiuj kantis, deklamis, prezentis teatraĵon, koruson, ĉinan artdancon, koncerton de Amindaj-Teamo Bachata. Ne mankis balo nek filmejo. Ĉi-foje, almenaŭ du novaj programeroj allogis la ĉeestantojn, "Aligatorejo" kaj "Gufujo", kiujn aranĝis Geomar Martínez Pérez.

Je la fino oni transdonis atestilojn al la sukcesintoj en la ekzamenoj de KEA (8 en la baza kaj 2 en la meza), same oni rekonis la laboron de la instruistaro per transdono de atestiloj, premiis la plej bonajn instruistojn, kaj ankaŭ la plej bonan E-filion de KEA, nome Santiago de Kubo. Estis anoncita la rezulto de la literatura konkurso, kiun gajnis s-rino Carmen Dubel Lachatagnerais Popa el Bajamo, provinco Granma. Je la ferma vespero estis prezentita la novelektita estraro, kiu gvidos la kuban esperantistaron dum la venontaj tri jaroj, sub prezido de Maritza Gutiérrez González.

Resume, ni povas ĝoji pri tio ke la 6-a KERo sukcese finiĝis. Ni ĉiuj revenis hejmen kun reŝargitaj baterioj kaj novaj defioj, ĉar laŭ estis anoncite, venontjare ĝi ne okazos, ĉar ni havas pli vastan celon, se temas pri eventoj, kaj ĝi estas la 9-a Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE), kiu okazos de la 11-a ĝis la 17-a de februaro 2018. Ni semas konstante!




## BOATEKSKURSO EN SANTIAGO DE KUBO

Ĉio komenciĝis per ideo de esperantistino el Caimanera, municipo de la provinco Guantánamo, kiu ekkonis pri boata ekskurso en la najbara urbo Santiago de Kubo. Mi komunikis ĝin al Guillermo Navarro en feriejo Salto de Jibacoa, septembre de 2016, kiu esploris pri la afero kaj poste informis min.

Dum januaro ĉi-jare ni planis okazigi la ekskurson, la 25-an de februaro, kaj sekve, la aranĝo-programo riĉiĝis per inda vizito al la granda ŝtono kiu gardas la restaĵojn de Fidel Castro, la historia gvidanto de la Revolucio, en la Tombejo Santa Ifigenia; ni kaptis la okazon por ekpaŝi cele plenumi intencon delonge pensitan pri esperanta ĝemeliĝo inter la provincoj Guantánamo kaj Santiago de Kubo.

Finfine, en la fiksita tago ni sukcese plenumis la aranĝojn, kaj en tiu solena loko, Julio César Tamayo, estrarano de la filio en Santiago de Kubo, alparolis la ĉeestantojn kaj okazis interŝanĝo de donacoj kiel bonvola esprimo.

Poste la grupo translokiĝis al la haveno por enboatiĝi. Ni ĝuis ĉarmegan boatveturadon, en bonaj interrilatoj kaj interkonatiĝoj, eĉ kun neesperantistaj santiaganoj kunvojaĝantaj en bela etoso.

Post la elŝipiĝo ni vizitis novtipan bierejon, kie inter malto (dolĉenigra senalkohola biero) kun lakto kaj klara biero ni daŭrigis nian esperantan babiladon por plifortigi la amikecajn ligojn.

Je la fino venis la adiaŭo kaj la esperantistoj de Guantánamo revenvojaĝis al sia provinco.

RAÚL SÁNCHEZ GUILARTE



## Mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, S-ino Irina Bokova, okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, la 21-an de februaro 2017

Okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, Unesko rekonfirmas sian kompletan engaĝiĝon por lingva diverseco kaj multlingveco. Lingvoj esprimas tion, kio ni estas, ili formas niajn pensojn kaj identecojn. Ne povas okazi aŭtenta dialogo, nek efika kunlaboro internacia, sen respekto al la lingva diverseco, kio permesas al ni la veran komprenon de ĉiu kulturo. La alireblo al la diverseco de la lingvoj povas veki la scivolemon kaj reciprokan komprenon de la popoloj. Tial la lingvolernado estas samtempe promeso pri paco, novigo kaj kreiveco.

La Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, dediĉita ĉi-jare al la multlingva edukado, estas samtempe okazo alvoki pri ago por la realigo de la celoj de la daŭripova evoluo, konkrete pri la 4-a celo: "Garantii inkluzivan kaj egalecan bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancojn por tutviva lernado". La edukado kaj la informado en la gepatra lingvo estas absolute esencaj por plibonigi la lernadon, kreskigi la memfidon kaj sinestimon, kiuj estas la plej potencaj motoroj de la evoluo.

Ni estas lingvaj estaĵoj. La kulturoj, la ideoj, la sentoj, eĉ la deziroj pri pli bona mondo prezentiĝas al ni, unue kaj ĉiam, en iu konkreta lingvo, per specifaj vortoj. Tiuj lingvoj entenas valorojn kaj viziojn pri la mondo, kiuj riĉigas la homaron.

La valorigo de tiuj lingvoj plilarĝigas la liston de eblaj futuroj, kaj kreskigas la energion bezonatan por atingi tiujn. Okaze de tiu ĉi tago mi alvokas pri la agnosko de la potenco de multlingva edukado ĉie, en la edukaj kaj administraj sistemoj, en la kulturaj kreaĵoj kaj en la amaskomunikiloj, en la interreto kaj en la komerco. Ju pli ni kapablos valorigi la lingvojn, des pli ni havos ilojn por konstrui futuron dignan por ĉiuj.

IRINA BOKOVA

## ELEKTOJ EN KUBA ESPERANTO-ASOCIO

Dum la 33-a Ordinara Kunsido de la Komitato de KEA, okazinta dum la 6-a KERo en Río Seibabo, elektiĝis nova Estraro de KEA por la mandato 2017-2020 kaj ankaŭ nova Estraro de la Kuba ILEI-Sekcio.

Nacia Estraro de KEA: **Maritza Gutiérrez González** (Prezidanto); **Alberto Fernández-Calienes Barrios** (Ĝenerala Sekretario); **Pedro Fernández Rodríguez** (Financo); **Julián Hernández Angulo** (Instruado / Universitata Agado); **Alberto Rodríguez Pineda** (Publikaj Rilatoj / Nacia Sidejo); **Javier Ramos Nistal** (Informado / Aktivula Trejnado); **Juan Ramón Rodríguez Gómez** (Kulturo / Historio / Biblioteko / Faka Agado).

Estraro de la Kuba ILEI-Sekcio: **Gonzalo Collantes García** (Prezidanto); **Marta Eugenia Alonso Gutiérrez** (Estrarano); kaj **Norberto Díaz Guevara** (Estrarano).

# ESPERANTO EN LA 26-A INTERNACIA LIBROFOIRO DE HAVANO

La 26-a Internacia Librofoiro, Havano 2017 estis oficiale inaŭgurita la 9-an de februaro en la fortreso San Carlos de la Cabaña. La evento estis ĉi-jare dediĉita al la intelektulo kaj politikisto Armando Hart Dávalos.

La librofoiro ankaŭ havas kiel gastlandon honoran, Kanado. Ĝi estas bona okazo por konatiĝi kun ok verkoj de Hart, kiuj estis prezentitaj de kubaj eldonejoj.

Kiel tradicie KEA havis standon en kiu estis ekspoziciitaj E-libroj kaj gazetoj, interalie, la nova eldono de *La historio absolvos min,* reeldonita de Monda Asembleo Socia (MAS), kun bibliografiaj notoj kaj aldonaĵoj.

La deĵorantoj en la stando de KEA disdonis informilojn, respondis demandojn de interesiĝantoj, kiuj alproksimiĝis al la stando, kaj informis pri E-kursoj en la tuta lando.

La Internacia Librofoiro de Havano estas unu el la plej amasaj kulturaj eventoj ĉiujare organizata de la kubaj kulturaj institucioj kaj la Instituto de la Libro. Ĝi daŭris dek tagojn en la ĉefurbo kaj nun itineras tra la ĉefaj urboj de la tuta lando.

KEA estos ankaŭ reprezentita ĉi-jare en la librofoira eldono en provincoj Guantánamo, Santiago de Kubo kaj Granma, pri kio ni raportos en la venonta numero de nia bulteno.





## Kuba muzikvideo en internacia konkurso: “Teo-revoj en amo-taso”




Kiel certe multaj scias, ekzistas internacia konkurso organizata de Ĉina Radio Internacia, ĝi estas “Teo kaj Amo”, kiu pasintjare estis tre alloga kaj vigla konkurso.

Laŭ gazetara komuniko de UEA ni informiĝis ke nun videblas la filmetoj por la dua konkurso “Teo kaj Amo” ĉe *http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016e/filme.htm,* kaj komenciĝis voĉdonado por la 10 plej ŝatataj filmetoj, bonvolu viziti la paĝojn kaj doni viajn voĉojn.

Danke al subtenado de Esperantujo, la kolektado de konkursaĵoj por la dua konkurso “Teo kaj Amo” ricevis tre bonan rezulton: entute temas pri 77 filmetoj el 27 landoj kaj 4 kontinentoj – Argentino, Brazilo, Ĉeĥio, Ĉinio, Ĉilio, Francio, Germanio, Italio, Indonezio, Kazaĥio, Kolombio, Kubo, Litovio, Nepalo, Pollando, Rusio, Turkio, Svedio, Svislando, Sud-Koreio, Slovakio, Ukrainio, Usono, Uzbekio, Venezuelo, Vjetnamio kaj Kongo (D.R.).

Dume pri la konkurso raportis amaskomunikiloj en Malajzio, Litovio, Ĉeĥio kaj Ĉinio. Ankaŭ pli ol dukdek landaj, regionaj, urbaj kaj aliaj E-organizaĵoj multe helpis kaj subtenis la konkurson.

Nun ok membroj de la ĵurio laboras por la rezulto de premiotoj. Aprile oni anoncos la rezulton kaj oktobre la premiotoj senpage partoprenos en la filmfestivalo “Teo kaj Amo” en Ĉinio. Freŝaj informoj kaj progresoj de la konkurso videblas ĉe: Facebook, Vkontakte kaj Twitter.

Kaj ĝuste pri tiu ĉi konkurso ni ricevis mesaĝon de Graciela Morgado el Contramaestre, distrikto situanta en la orienta parto de Kubo, kie naskiĝis la muzikensemblo Amindaj, kaj aktiva E-Grupo kun partopreno en la kultura vivo de sia loĝloko.

La mesaĝo de Graciela rilatas al la nuntempa partopreno de Amindaj en tiu ĉi internacia konkurso.

Ŝi informas vin, “ke nia muzikvideo, kiu partoprenas en la ĉina konkurso Teo kaj Amo disponeblas en interreto, kaj ni esperas ke vi donos vian voĉon; tio multe helpos, vi ankaŭ povas peti tion al viaj geamikoj diverslande”.


Vi povas voĉdoni favore al la filmeto kies titolo estas “Teo-revoj en Amo-taso”, ĉe *http//esperanto.cri.cn/teokajamo2016e/filme.htm*

Serĉu ĝin en tiu retejo, kie aperas ĉiuj partoprenantaj filmetoj el diversaj landoj. Nia konkursaĵo aperas en la rubriko Amerika Kontinento por ke estu pli facile trovi ĝin.

Do, jen invito al ĉiuj geamikoj viziti tiun retejon kaj voĉdoni por la konkursaĵo de Amindaj, la kuba teamo kiu regalos vin per muziko.

La redakcio

# SCIENCPOPULARIGO: Pri kreoliĝo de Esperanto (I)




Sciencpopularigaj temoj ĉiam estas utilaj por la esperantistoj kaj tial ni rekomendas al ĉiuj konsulti kaj eĉ tralegi la libron *Por aktiva lingvopolitiko,* kiu enhavas la aktojn de simpozio okazinta en Prago 1996, kaj poste libroforme eldonita de UEA.

Ni ŝatus aparte alproksimiĝi al eseo verkita de d-ro Renato Corsetti "Kreoliĝo de Esperanto inter personaj gustoj kaj oficiala normo".

Lia teksto komenciĝas surbaze de analizo pri la scienca agado de alia konata kaj jam forpasinta fakulo, d-ro Detlev Blanke el Germanio, certe unu el la plej konataj nuntempaj studintoj de la fenomeno "planlingvo", kiu en ĉiuj siaj verkoj, sendepende de la eldonjaro kaj de la eldonlingvo, daŭre rekonfirmas almenaŭ unu saman ideon: nome, ke el ĉiuj ekzistantaj lingvoprojektoj nur unu iĝis vera lingvo.

Temas, laŭ Blanke, pri la internacia lingvo Esperanto, iniciatita de L. L. Zamenhof en 1887.

Do, laŭ la citita aŭtoro – kaj cetere laŭ pluraj apogantoj de Esperanto, ĉar la asertojn de Blanke ni retrovas en preskaŭ ĉiuj informbroŝuroj pri Esperanto eldonitaj de internaciaj kaj naciaj E-organizaĵoj – Esperanto iĝis vera lingvo de vera komunumo, kiu eĉ komencis instrui ĝin denaske al siaj idoj.

El tiu vidpunkto, asertas Corsetti, la nuna situacio de Esperanto estus simila al tiu de piĝinaj lingvoj en la momento en kiu ili ekiĝas kreolaj. Kvankam miaj personaj sentoj puŝas min konsenti kun ĉi tiuj asertoj (ĉar mi mem persone estas unu el tiuj homoj, kiuj uzas Esperanton normale ĉiutage, almenaŭ dum la vespermanĝo kun la tuta familio), mi opinias ke scienca objektiveco devigas min flankenmeti miajn dezirojn kaj substreki ĉiujn elementojn, kiuj laŭ mi igas Esperanton speciala kazo.

Laŭ mi, fakte, la procedo de plena lingviĝo de Esperanto ankoraŭ ne estas kompleta.

Alivorte Esperanto estas normala, kompleta lingvo nur por parto de siaj parolantoj – tiuj, kiuj nur uzas ĝin.

Dume alia parto – tiuj, kiuj ĉefe okupiĝas pri ĝia studado kaj pri verkado en ĝi, ne pri ĝia praktika uzado – emas ankoraŭ pritrakti ĝin kiel lingvoprojekton.

La relativa pezo de la du partoj supre menciitaj estas malfacile difinebla, kaj el tio mem sekvas ke certe la parto, kiu nur uzas ĝin, por kiu ĝi estas nur lingvo kaj ne plu lingvoprojekto, ankoraŭ ne decide superpezis la alian.

Rezulte, d-ro Corsetti en sia verko komparas Esperanton kun la kreolaj kaj piĝinaj lingvoj, tiel ke la leganto povas sekvi la tutan procezon, kiu fundamentas lian aserton. Do, ni proponas al vi reveni pri la temo en nia venonta numero!

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

DETLEV BLANKE, ROY MACCOY, OSMO BULLER: *Por aktiva lingvopolitiko.* Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81-a Universala Kongreso de Esperanto, Prago 1996, 148 x 210 mm, 72 p. Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo, 1999, ISBN 92 9017 062 X.

# *Poezio*




*Hodiaŭ ni prezentas al vi du poemojn originale verkitajn en Esperanto de s-ino Carmen Dubel Lachatagnerais Popa, aktiva esperantistino de Bajamo (Granma), kiu sukcese prezentiĝis en la Literatura Konkurso de KEA 2016.*

**Libereco**

Patrino, diru al mi:
kio estas paco?
kio estas espero?
kio estas libereco?

Filino, vi povas senti pacon
se vi donas amon,
se vi donas amikecon.
Se vi donas solidarecon,
via koro sentos pacon.

Kiel ni povos vivi sen espero,
sen iluzio,
sen la luno, kiu lumigas
la animojn?

Se vi kunigas
pacon kaj esperon,
vi akiros liberecon!

**Kara planedo**

Trankvile mi pensas kaj bedaŭras,
trankvile mi suferas
sur la benko de parketo,
en mia hejmo,
en la lernejo,
mi estas malgaja kaj ploras.
Vi demandis al mi:
Kio okazas al vi?
Mi respondas:
Mia kara mondo,
la blua maro,
niaj riveroj,
niaj verdaj arboj,
nia blua ĉielo.
Kio okazos estontece?

Ĉu mi povos vidi la belan ĉielarkon,
nian karan bestaron,
la verdan kamparon?

Bedaŭrinde, ni povos detrui ĝin?
Oh! Kara homaro,
Mi petas al la kulpuloj:
Helpu nian karan planedon.
Mi estas helpanto!

## PETO DE LA KORESPONDA SERVO DE JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

La Koresponda Servo de JEI peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj korespond-dezirantoj. Se vi interesiĝas pri korespondado kun japanoj, bonvolu turni vin al:

**Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto**
**Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio, Japanio / Japón**

Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi nian laboron. Ni atendas vian afablecon plenumi nian peton. Kun anticipa danko ni kore salutas vin.

NOBUO SAKURAI
Respondeculo de Koresponda Servo de JEI

## José Martí: pensoj pri popola edukado

La 28-an de januaro, tradicie oni memoras nialande la naskiĝon de la Nacia Heroo José Martí en 1853, unu el la plej elstaraj filoj de Kubo ĉiuepoke, tial la Martí-klubo de KEA ne volas preteratenti tiun ĉi novan datrevenon kaj volas dediĉi omaĝeron al la figuro de la nacia apostolo kies ideario kaj humanisma agado daŭre validas en niaj agadoj.

José Martí, krom elstara pensisto, oratoro kaj organizanto de la sendependiga milito kontraŭ la hispana koloniismo, ankaŭ estis elstara verkisto kaj poeto kaj lasis al ni vastan heredaĵon forme de ideario pri plej diversaj temoj.

Ĝuste tial ni volas prezenti al vi unu el liaj famaj edukaj pensoj:

> "Instruado kaj edukado ne samas: instruado rilatas al pensado, kaj eduko precipe al sentoj. Tamen, ne ekzistas bona eduko sen instruado. La moralaj kvalitoj prezaltiĝas kiam emfazitas de inteligentaj ecoj".

## LITERATURA KONKURSO "ARTO ESTAS MI…"

La literatura Martí-Klubo *Patrio estas Homaro* invitas ĉiujn esperantistojn partopreni la Literaturan Konkurson "Arto estas mi…", kiu okazas jam por la 4-a fojo sinsekve kun la celo evoluigi en Kubo la belartojn pere de Esperanto.

La konkurso temos pri originalaj kaj tradukitaj verkoj de kubaj aŭtoroj. Ĝin rajtas partopreni ĉiuj esperantistoj, membroj de nia landa asocio. Ĝi havas du branĉojn: poezio kaj prozo.

Originala poezio, maksimuma longeco 2 paĝoj.
Originala prozo, minimuma longeco 4 paĝoj.
Tradukita poemo, maksimuma longeco 3 paĝoj
Tradukita prozo, minimuma longeco 4 paĝoj

Oni rajtas sendi nur du konkursaĵojn por sama branĉo. Oni sendu ilin en du ekzempleroj al:
**Pedro Fernández Rodríguez**
**Vista Alegre 264 entre Juan Bruno Zayas y Luz Caballero**
**La Víbora, 10 de Octubre, 10500 La Habana.**
Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de decembro 2017.

La konkursanto devas signi ĉiun partoprenaĵon per pseŭdonimo kaj aldoni – en fermita koverto – slipon kun la pseŭdonimo kaj la vera nomo kaj adreso. Sur la koverto oni skribu nur la pseŭdonimon kaj la branĉo(j)n partoprenata(j)n. Ĉe elektronike senditaj konkursaĵoj, la konkursanto devas signi ĉiujn partoprenaĵon per pseŭdonimo kaj ankaŭ la veran nomon kaj adreson. Por konservi la striktan anonimecon, la sekretario de la konkurso kopias la koncernajn konkursaĵojn en novan elektronikan dosieron (aŭ sur paperon), kun la pseŭdonimo sed sen la vera nomo kaj adreso, kaj sendas ilin al la koncernaj juĝantoj.

Estos nur unu monpremio por ĉiu branĉo kaj originala kaj tradukita verko. Trimembra ĵurio elektita de la Nacia Estraro de KEA decidos pri la premiotaj verkoj. Oni povas ankaŭ alĵuĝi menciojn. La premiitaj verkoj aperos en la bulteno *esperanto.cu*. La rezulto estos informita dum la Komitatkunsido de KEA en 2018.

Pedro Fernández Rodríguez
Sekretario / Martí-Klubo
Kontaktadreso: *pedrito@esperanto.co.cu*

## ESTRARA KOMUNIKO Invito kaj instigo al novaj defioj

Okaze de la ĉi-jara Komitatkunsido okazinta en Río Seibabo, kiel parto de nia evento KERo 2017, elektiĝis nova estraro kiu akompanos min en la gvidado de la asocia laboro tutlanda.

La nuna estraro de KEA eniras la unuan jaron de sia mandato kaj kiel signo de kontinueco, diversaj aspektoj de la estrara laboro restas konstantaj, sed gravas ankaŭ difini prioritatojn por la evoluiga laboro kiu kondukos al renovigoj, ŝanĝoj kaj firmigo de la jam solidaj bazoj de nia landa asocio. Tio estas la celo de nia unujara laborplano, kiu etendiĝos ĝis inkluzive februaro de 2018, kiam okazos nialande la 9-a Tutamerika Kongreso de Esperanto.

Tiucele ni ellaboris dokumenton kiu estas kongrua kun la ĝenerala direkto de la Strategia Laborplano de UEA ĝis 2017, sed baziĝas sur la plej lastaj evoluoj kaj konstateblaj bezonoj de nia Asocio sur la diversaj agadkampoj. Ĝi estas plia paŝo al pli konstanta kaj eksplicita planado en la Asocio kaj enhavas prioritatajn taskojn enkadrigitajn en la kvar agadkampoj de la strategia laborplano de UEA. Tiuj prioritatoj gvidas nian agadon. Ili estas, laŭorde, kaj kongrue kun la edukaj bezonoj kaj membrovarbado, intensigi kursofertojn kaj organizi trejnseminariojn por prepari instruontojn tra la tuta lando; kunlige al tio, la kreado de pli solida aktivula kaj organiza bazo ekster la Estraro sur la kampoj de Informado kaj Aktivula Trejnado; publikigo de materialoj pri la ĉefaj temoj por 2017. La oficiala organo de KEA, nome *esperanto.cu,* devas konstante kaj kvalite reliefigi la laboron kaj vivon de la Asocio; la renovigo de la retejo kaj ĝia funkciigo estas necesa paŝo al konkretiĝo de ĉiuj niaj planoj kaj programoj; ekrealigo de difinitaj partoj de tiu plano, kun fokuso al informado, membrovarbado kaj publika bildo de la Asocio.

Kiel aprobite dum la Komitatkunsido ĉi-jara, ni laboru kiel eble plej realisme por prepari eventualan reformon de la struktura membro- kaj kotiz-sistemo de KEA, kune kun la necesaj ŝanĝoj en la Ĝenerala Regularo; kaj prizorgi la bibliotekan funkciadon, kaj katalogadon; konservadon de niaj dokumentoj kaj historiaj trezoroj; iniciati laŭeble esplorprojekton kaj aktive labori en la celebrado de Zamenhof-Jaro tra la tuta lando.

Grava ero en la asocia vivo estas la eventoj, kaj tiucele estis proponita kaj aprobita dum la komitata kunsido, la realigo de lokaj aranĝoj, forumoj, metiejoj en la provincoj Cienfuegos, Villa Clara (Santa Clara), Santiago de Cuba, Granma kaj Guantánamo.

Eksterasociaj eventoj estas ankaŭ prioritataj en la kultivado de niaj publikaj rilatoj kun la celo iom post iom labori por ŝanĝi kaj aktualigi la publikan bildon de Esperanto en Kubo; agadi por aktiva partopreno en Unesko-rilataj temoj kaj ĉe la Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj (ACNU); reprezentiĝo ĉe evento de la Domo de la Amerikoj: 6-a Internacia Kolokvo "La kultura diverseco en Karibio" (Havano, 22-26 majo); "Lingvoinstruistoj por pli bona leciono" (Universitato de Pedagogiaj Sciencoj, Havano, 26-27 majo); "Krisolo de la Nacieco", (Bajamo, 17-20 oktobro). Evento de la Centra Universitato Marta Abreu de Las Villas (UCLV): 4-a Internacia Simpozio pri Humanismaj Studoj (Cayo Santa María, oktobro).

Agadi por sukcese okazigi la internacian kongreson tutamerikan, tio estas, la 9-a TAKE (Havano, 11-17-a de februaro 2018). La koncerna LKK eklaboras tiucele kaj komunikos pri ĝi la landan kaj internacian esperantistaron. Kaj laste, ni volas emfazi, ke indas agadi por ke la Komitato de KEA pli aktive laboru en la planado kaj agadoj de la asocia vivo dum la tuta jaro. Defioj ĝenas, sed ĉiam bonvenas!

Maritza Gutiérrez González
Prezidanto

## INFORMILO n-ro 1 DE LA CENTRA OFICEJO (ĝis 2017-03-31, CUP)

**MEMBROJ-SUBTENANTOJ 2017 (50)**
★ **La Habana (28):** Alberto Fernández-Calienes Barrios; Alberto Rodríguez Pineda; Alejandro García Acosta; Ángela María Pedroso Cuesta; Ariadna García Gutiérrez; Charlie Joan Obregón Cepero; Daimi Doval Delsa; Digna Mayra Morales Burón; Geomar Martínez Pérez; José Evelio Cárdenas Zúñiga; José Luis Hernández Carvajal; Juan Carlos Montero Medina; Juan Ramón Rodríguez Gómez; Julián Hernández Angulo; Luis Enrique Rizo García; Luis Enrique Sotolongo Gilchrist; Magaly Valdés Serrú; María Antonia Cartaya Martínez; Maritza Gutiérrez González; Marta Eugenia Alonso Gutiérrez; Mayra Núñez Hernández; Miguel Ángel González Alfonso; Olga Lidia Barrios Cunningham; Oscar Asensio Pisciotta; Pedro Fernández Rodríguez; Teresa Cepero Tejeda; Vilhelmo Lutermano; Yordán Fonseca Olivera; ★ **Villa Clara (8):** Dunieski Aguilera Barrera; Eddy Machado Hernández; Ena González Machado; Manuel Antonio Fuentes Gary; Nadia Peeva Miteva; Noelys Caridad González Hernández; Roberto Molina Gálvez; Yusimith Barrera Camacho; ★ **Cienfuegos (1):** Alina Zuaznabal Himely; ★ **Sancti Spíritus (1):** Yoandra Rodríguez Labrada; ★ **Camagüey (1):** Jorge Luis González Santillán; **Las Tunas (2):** Anida Santiesteban Garcés; Juan Miguel Leyva Carralero; ★ **Guantánamo (9):** Asiel Torres Laurencio; Iliagne Torres Jardines; Julia Lescaille Fernández; Leonardo Luna Neyra; María Lisandra González Hurtado; Miguel Luis Vera Challinger; Roberto Claro Guerrero; Tania Laurencio Molina; Tirso Ávila Bory.

**DONACOJ (3 243.00)** ★ **Martí-Klubo (1 420.00):** Olga Lidia Barrios Cunningham (100.00); María Antonia Cartaya Martínez (50.00); Pedro Fernández Rodríguez (200.00); Vilhelmo Lutermano (1 000.00); Angela Pedroso Cuesta (70.00). ★ **Fonduso Instruado (2 159.00):** Pedro Fernández Rodríguez (200.00); Lotumado dum KERo 2017 (215.00); Aŭkcio dum KERo 2017 (250.00); Vilhelmo Lutermano (1 088.00).


*Al ĉiuj donacintoj KEA tre kore dankas.*

**Vi certe jam pagis vian kotizon por 2017, aŭ eble vi jam eĉ varbis novan asocianon. Se ne, jam temp' está!**

---

esperanto CUBA
**Kuba Esperanto-Asocio**
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
*kubesp@enet.cu*
*www.esperanto.cult.cu*

**9-a Tutamerika Kongreso de Esperanto**



Havano, Kubo
11-17 februaro 2018

*Lingvoj kaj kulturoj:*
*edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj*

***Amika voĉo el Kubo, Libera Teritorio en Ameriko***

*www.radiohc.cu/eo*

RADIO HABANA CUBA

**RADIO HAVANO KUBO**
**Kurtondaj kaj retaj elsendoj en Esperanto**
**Nun ankaŭ en FM!**